★ # NORDA GAZETO

DUMONATA BULTENO
DE LA
NORDFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

Redaktoro kaj responda eldonanto :
Lucien BOURGOIS,
21, Rue Gambetta,
NOYELLES-GODAULT (62).

Kotizoj (kun bultenservo)

| | | |
|---|---|---|
| a) | Junuloj | : 2 Fr. |
| b) | Aktiva membreco | : ~~3 Fr.~~ |
| c) | Subtenanto | : 5 Fr. |

Fédération Espérantiste du Nord de la France
17, Rue des Bouvreuils, ARRAS (62).

---

Informilo n-roj 4-5 — Julio-Oktobro 1965

## AŬTUNA RENKONTIĜO - AMIENS, 17 OKTOBRO 1965

Estimataj Federacianoj,

La NFEF elkore invitas vin honori per ĉeesto la federacian renkontiĝon, kiu okazos en Amiens (Somme), la 17-an de Oktobro, laŭ la jena programo :

| | |
|---|---|
| 10.00 h. | Laborkunsido ĉe la urbodomo. |
| 13.00 h. | Kunmanĝo ĉe "Au Rallye", 24, strato des Otages. |
| | Prezo : 10 Fr. (kun biero k mineralakvo). |
| Menuo : | Salmo kun majonezo - Rostita kokidaĵo - Legommiksaĵo - Fromaĝo - Deserto - Kafo. |
| | Loterio. |

Se dezirate, oni povas antaŭpagi ĉe la pĉk. PARIS 741298 : AMIENS-ESPERANTO.

Limdato de la bankedaliĝo : 10-a de oktobro.

<u>Bankedaliĝo k fervojaj kongresrabatiloj</u> :

Por ambaŭ oni sin turnu al : F-ino MAUCHIEN, 10, rue de Noyon, 80-AMIENS, kiu anticipe deziras al ĉiuj bonan apetiton!

Jam de nun, rezervu tiun daton, notante ĝin en vian agendon.
Ni kalkulas kun via multnombra partopreno.
Ĝis plezuriga revido en Amiens!

La Federacia Estraro.

## POR KAJ PLI LA JUNULOJ.

Koncerne ĉiujn komunikaĵojn en ĉi tiu paĝo, interesatoj sin turnu al :

Alain OUTREMAN, 19, Avenue Clémenceau, 62 - LONGUENESSE.

1 - Sekcio de Junuloj : Nun, ekzistas interne de la Federacio, kaj ekde nun aperos en ĉiu numero de NORDA GAZETO paĝo pritraktanta junularajn temojn.

La provizora sekretario (ĉe la ĉisupra adreso) PETEGAS ĉiujn esperantistajn gejunulojn el la federacia teritorio membriĝi (senpage) per alsendo de NOMO, ADRESO, AĜO, OKUPO, kaj eventuale sugestoj pri estonta agado.

Li plezure rilatos kiel eble plej frue kun :
J.P. MAILLY, Alain RINGOTTE, F-ino BOCKTAELS.

2 - La Franca Junularo estas organizita.
Estos interese konigi nian ekziston, kaj laŭ la eblecoj partopreni en la agado sur la nacia kampo.

3 - La Tutmonda Junularo estas organizita sub la nomo T.E.J.O.
Ni bezonis "T.E.J.O."-n kaj T.E.J.O. bezonas nin. Do, estus ankaŭ interese partopreni ties agadon, ne individue sed GRUPE, ekzemple per enkonduko en la ESPERANTISTAN MOVADON de ne-esperantistaj junuloj interesataj pri nia estonta aktiva vivo, aŭ per alsendo de artikoloj pri niaj komunaj problemoj por KONTAKTO.

KONTAKTO estas ege interesa revuo eldonita de T.E.J.O., plene rekomendinda al ĉiuj, kiujn interesas la vidpunktoj, problemoj, esperoj k klopodoj de la nuntempa junularo.

NE HEZITU peti informojn, eĉ senpagan specimenon, al Alain OUTREMAN!

N.D.L.R. : Bonvenon al nia junulara sekcio k gratulon al S-ro OUTREMAN, kiu konsentis preni sur sin la taskon ĝin ekmovigi.
Ni alvokas ĉiujn grupestrojn, ĉiujn plenkreskajn unuopulojn varbi junulojn por nia sekcio. Antaŭandankon!

### Korespondanonco :

La E-Klubo en VILJANDI deziras kontaktiĝi kun alilandaj E-Kluboj kaj solaj (individuaj) esperantistoj. Interŝanĝas tekstojn de kantoj, pensojn pri kluba vivo, ktp. Ĉar nia klubo estas sekcio de niaurba Klubo de Internacia Amikeco, kie oni ankoraŭ uzas la jenajn lingvojn : angla, germana, rusa, hispana, itala, ni povas ankaŭ peri la korespondadezirojn rilate tiujn lingvojn.

Interesatoj sin turnu al :

S-ro A. MIKK, Str. Jakobsoni 3-2, VILJANDI
(Estona) SSR - U.R.S.S.

# OSTENDO - Pentekosto 1965

Tre interesa etoso ĉe la Nacia Belga Esperanto-Kongreso en Ostendo, dank' al la ĉeesto de multaj eksterlandanoj, kiuj partoprenis la 4-an Markolan Kongreson.

Fakte, la du kongresoj estis kunligitaj; kaj tio estis sukceso, miaopinie. Krom apartaj laborkunsidoj de BEF k de la Markolanoj, la aliaj programeroj estis komunaj.

Pli ol 200 esperantistoj el 10 landoj ĉeestis en la Festpalaco de la "Reĝino de la Belga Marbordo". Nenio mankis por la sukcesigo de tiuj tri pentekostaj tagoj : bela vetero kaj elektita programo.

Sabate, varieta vespero kun amuza numero de nia ventroparolanta amiko Ben WEBER kaj konkurso pri klereco k lerteco.

Dimanĉe, akcepto de la Urbestraro k vizito de la Urbodomo. Vizito al la muzeo de Belartoj. Unuhora boatekskurso. Vespere, bankedo sekvata de granda balo ĝoje arigis ĉiujn.

Tuttaga ekskurso al la Bruĝa regiono per du aŭtobusoj k aŭtokaravano finis, lunde, tiun memorindan renkontiĝon.

Dum la tri tagoj, konstanta ekspozicio en la halo de la Festpalaco ebligis al la vizitantoj admiri gravan kolekton da esperantlingvaj libroj.

Speciale, ni menciu la gratulojn de S-ro JAUMOTTE, Prezidanto de BEF, al Federacianino, F-ino Yolande HARDELIN. (1)

Pro la perfekta organizado de tiu internacieca kongreso, pro la taŭga akceptado de la partoprenintoj k la bona memoro, kiun ĉiu konservos pri ĝi, ni varme gratulas ĉiujn LKK-anojn.

Ni rendevuas ĝis la proksima jaro en Folkstono.

F. DITACROUTE.

(1) NDLR : Membro de la Esperantista Grupo en Valenciennes, F-ino Yolande HARDELIN ricevis stipendion de la Rotary-Klubo kaj decidis entrepreni rondvojaĝon tra 13 eŭropaj landoj kun amikino, Jocelyne THIETARD.

Ve! Sur germana aŭtovojo, ilia duĉevalo koliziis kun alia veturilo.
Yolande HARDELIN suferas pro makzela frakturo k ŝia kunulino havas kranifrakturon. Aviadilo rekondukis ilin al Francujo.

Esperante, ke ĉi tiu trafikakcidento ne havos fatalajn sekvojn, ni deziras al ambaŭ plenan resaniĝon.

RAPORTO PRI LA LABORKUNSIDO DE
LA "MARKOLANOJ"
EN OSTENDO (6-6-65)

---

Tuj post finiĝo de la kunsido de la Belga Esperantista Junularo eniris la salonon "VITTERYCK" ĉirkaŭ 50 personoj - inter ili proksimume tiom da virinoj, kiom da viroj : vera ge-samideanaro.

Plej multnombraj estis la ge-angloj. Sed tio ne surprizis la ĉeestantojn, ĉar la membroj de BEF tiutempe partoprenis propran kunvenon en apuda ĉambro, dum kelkaj Nordfrancoj troviĝis en HAVRO por ĉeesti nacian kongreson.

Kiel estraranoj funkciis kvin personoj :

- du el Francujo : S-ro ODENT, rolanta kiel anstataŭanto de S-ro DOYELLE; kaj S-ro DITACROUTE;
- du el Anglujo : S-ro HARTRIDGE kaj S-ino MARKARIAN;
- unu el Belgujo : S-ro MARMENOUT.

S-ro ODENT, akceptinte gvidi la diskutadon, substrekis en enkonduka parolado la fakton, ke post kvar jaroj la juna "Markola Konfederacio" ankoraŭ bezonas paciencan flegadon kaj persisteman fortikigon; kaj li esprimis la opinion, ke ĝi estos vivkapabla realaĵo nur kun la subteno, en harmonia kunlaborado, de la tri "landaj organizaĵoj : NFEF, OSEF kaj BEF.

Li poste prezentis la diversajn temojn pritraktindajn en rilato kun la estonto de la Konfederacio.

S-ro HARTRIDGE tiam emfazis la senutilecon de formala "regularo" : bezonataj estas rektaj kontaktoj inter la gvidantoj de la tri koncernaj organizaĵoj.

Pro la malmulto da disponebla tempo, la partoprenantoj estis petitaj nepre prezenti skribe siajn sugestojn, rimarkojn, (konstruajn) kritikojn, k.t.p.

Kiam venis (tro rapide!) la momento por disiĝi, kelkaj punktoj estis tamen priparolitaj; kaj la jenaj farendaĵoj estis deciditaj :

1. S-roj ODENT, HARTRIDGE, MARMENOUT plue studos inter si la diversajn aspektojn de la konfederacia vivo.

2. La 5-a Markola Kongreso espereble povos okazi en FOLKSTONO je Pentekosto 1966; kal la 6-a en KALEZO, je Pentekosto 1967 (tiam kunlige kun la Nacia Kongreso).

3. La redaktoroj de "Norda Gazeto", "Ora Sago" kaj "Sonorilo" estas petataj diskonigi ĉiujn novaĵojn koncerne la konfederaciajn okazaĵojn.

4. Estonte, pli da propagandcelaj klopodoj - fare de la kongreso-organizantoj -estos dediĉataj al la ekstera publiko.

5. Kiam Markola kongreso okazos en la kadro de nacia kongreso, oni zorgu, ke ĉiuj "Markolanoj" povu senĝene ĉeesti sian konfederacian laborkunsidon.

Konklude : spite al tute certaj mankoj, utila laboro estis farita. Ni esperu, ke la estonto montros ĝin fruktodona!

Post privataj konversacioj kun

S-roj HARTRIDGE kaj MARMENOUT,

Redaktis :

G. ODENT.

---

Raporteto pri la nacia kongreso en LE HAVRE

Post la malfermo de la kongreso, la Prezidanto senkulpigis multajn personojn. S-ro GUILLAUME parolis pri la agado de U.F.E., de U.E.A. kaj de la delegitoj.

S-ro ROUSSEAU prezentis sian raporton pri financaj aferoj. Pri la propono de S-ro GOUGET, S-ro Pierre ROGER prezentis rezolucion por ŝanĝi la kontregistradon de U.F.E.. Oni konstatis, ke trovi bonan kontregistradon estas malfacile; S-ro JOSSINET faris proponon, kiu estos ekzamenata.

Poste, oni elektis parton de la komitato; ĉiuj kandidatoj prezentitaj de la estraro : ALBAULT, AISBERG, ASQUERY, BERLOT, BERNARD, BLANC, DETVILLER, THIERRY, estis elektitaj.

Nia Prezidanto raportis pri la kultura semajno en Grésillon.

Je la dek-unua k duono ni iris al la urbdomo, kie la urbestro eldiris bonvenigan paroladon. Li aprobis la agadon de la esperantistoj pri la interkompreno de la popoloj k pri la klopodoj por la paco en la mondo. Respondis al li nia prezidanto k pluraj ali· landanoj (Hungaro, Bulgaro, Svedo, Brito), kiuj dankis lin pro lia afabla akcepto.

Post la bankedo komenciĝis la laboro sub prezido de S-ro PHILIPPE. Oni parolis pri la gazetara servo k pri pluraj proponoj, kiujn - diris la prezidanto - oni ne povas konsideri, ĉar mankas la plej utila aĵo, nome : mono. Tamen, oni diskutis la proponon, kiu celas malgrandigi la nombron da bultenoj k samtempe riĉigi nian nacian revuon. La afero estos diskutata.

Poste, oni ekzamenis la proponon de S-roj GOUGET k MAILLARD por modifi la balotsistemon rilate la komitatanojn. S-ro THERY montris, kial ne estas necese ŝanĝi ĝin. Tamen, oni decidis, ke en la bulteno oni publikigos balotilon, sur kiu ĉiu membro skribos la nomojn de la elektotaj kandidatoj. Tiuj voĉdoniloj sendotaj al la federacio permesos al la delegito elekti la kandidatojn laŭ la deziroj de la federacia membraro.

La kongreso decidis unuanime akcepti G.E.E. (1), kiel specialan fakon de U.F.E.

La prezidanto prezentis la jenan peton :

Se membro de U.F.E. deziras fari kritikojn pri la agado de la komitato, ĉu li devas sendi ilin al la komitato, por ke ĝi povu diskuti la aferon, anstataŭ fari tion per propraj cirkuleroj ?

Per baloto, la propono estis preskaŭ unuanime akceptita.

Oni ankaŭ diskutis la proponon de la federacio Centro-Okcidento pri diversaj aferoj. S-ro GUILLAUME elmontris, kial nune oni ne povas alpreni tiujn proponojn.

U.E.A. petas de ĉiuj esperantistoj novan penadon por kreskigi la nombron de la individuaj subskribantoj al la propono destinita al Uno.

Per cirkulero k parolado de S-ro SIMONNET, Tejo petas helpon por venki sian financan krizon.

Por 1966, oni proponas kiel kongresurbon Nice, Bourges aŭ Vichy.

Por 1967, la propono koncerne la elekton de Calais, kiel lokon de la nacia kongreso, estis akceptita.

Antaŭ ol fermi la kongreson, oni gratulis ĉiujn membrojn de la grupo de Le Havre pro la bona organizo de la kongreso, de la ekskurso, de la prezentado de la dokumentaj filmoj, ne forgesante la agrablan varietan vesperon kun la folkloraj dancistoj kaj dancistinoj.

Raportis : CONTARD.

(1) Groupe des Espérantistes de l'Enseignement.

# NIA VIVO

Amiens : F-ino MAUCHIEN, Departementa Sekretariino, kaj ŝia nevino pasigis kun F-ino LECLERCQ trisemajnan restadon en Grésillon.

Berck-Plage : Federaciano, S-ro SYBILLE, kuŝas ĉe la loka hospitalo"Hélio-Marin", kie li ricevis ĥirurgian intervenon pro abceso ĉe la galveziko. Ni deziras al li senprokrastan resaniĝon.

Hejma adreso : S-ro SYBILLE, 13, rue Armand, BERCK-PLAGE.

Bourbourg - Naskiĝo : la 3-an de aŭgusto naskiĝis en Malo-les-Bains Frédéric, filo de nia kasisto Jacques DOYELLE.
Al la feliĉaj gepatroj ni direktas nian sinceran gratulon pro tiu ĝojiga evento.
Adreso : 9, Rue de Dunkerque, 59-BOURBOURG.

Roubaix-Tourcoing.- La klubo kore invitas la federacianojn ĉeesti projekciadon per koloraj diapozitivoj (de S-roj STRAGIER kaj GILOTEAUX), kiu havos lokon en Centre Culturel, 100, Rue de Lille, TOURCOING, sabate, la 6-an de novembro, je la 17-a h.
Dimanĉe, la 12-an de novembro, je la 15-a h, okazos ĉe S-ro LEGRAND, 356, Rue Ingres, ROUBAIX, jarfina festkunveno.
Programeroj demand-ludoj, loterio kaj plano por 1966.

## Propono al UNO :

Roubaix-Tourcoing.- Ĝis la 10/9/65 : sume 210 kolektivaj k 80 individuaj subskriboj. La urbestro de CROIX ĵus subskribis.

N.D.L.R.- Brave al niaj agemaj Rubez-Turken-anoj pro la vastskala kolektado de subskriboj.
Notinde, ke 40 ministroj kaj 37 organizaĵoj petas, ke Uno efike subtenu Esperanton.

## LA GAZETARO KAJ NI :

"Paris-Jour" (8/6/65). Sub la titolo : "Pour parler français, apprenez l'Espéranto" aperis artikolo verkita de P.H. MARIN.
Li intervjuis Hungaron, Profesoro FARKAS, instruisto pri franca lingvo ĉe liceo en Szeged, kiu ĉeestis la nacian E-kongreson en Le Havre.

Dek franclingvaj revuoj por junuloj regule publikigas artikolojn pri kaj per Esperanto. Lastaj titoloj : D-ro ZAMENHOF - Primoŝten - La maorioj - Humoro sen landlimoj, ktp.

4 ĵurnaloj de Roubaix-Tourcoing aperigis sume dek artikolojn pri la U.K. de Tokio.

Valenciennes.- La esperantlingva parto, kiun ~~xxxxxx~~ la klubo ricevis de la nova prezidento de Aŭstrio (1), S-ro Franz Jonas, lerta esperantisto, aperis en "Heroldo de Esperanto".

---

(1) = la nova prezidanto de la aŭstria respubliko (prezidento = prezidanto de respubliko).

## LA IDEO PRI HELPLINGVO
(daŭrigo)

Nur dum epokoj multe pli proksimaj de ni, k ĉefe ek de la XVII-a jarcento, elstaraj filozofoj k kleruloj kiaj BACON, COMENIUS, LEIBNITZ, CONDORCET, CONDILLAC, VOLTAIRE, BEAUZÉE, AMPERE, ktp., provis krei pli-malpli taŭge ellaboritajn sistemojn de universalaj lingvo aŭ skribo. En ĉi tiu rapida resumo, ni ne forgesu mencii la grandan René DESCARTES, kiu - jam en la jaro 1629 - skribis : "la artefarita lingvo estas farebla, kaj oni povas eltrovi la sciencon de kiu ĝi dependas." En sia letero al Patro MERSENNE li jam indikis la bazojn, sur kiuj estas konstruebla tiu lingvo.

En ĉi tiu skizo, ja estus tro longe k tede eĉ resume mencii la multajn projektojn pri universala lingvo, kiuj naskiĝis, ĉefe en la epoko de la Granda Revolucio. Ni tamen memorigu - informcele -, ke Raymond POINCARÉ mem traktis tiun problemon. En 1880, kunlabore, li aperigis en Nancy verkon, en kiu li proponis projekton de helplingvo konstruota sur la bazoj de la malnovgreka lingvo.

### KLASIFIKADO DE LA SISTEMOJ

Tri centjaroj da provoj produktis ĉirkaŭ 320 projektojn por solvado de la helplingva problemo. Tiuj projektoj tiel malsimilas unuj la aliajn, kiel iliaj propraj bazoj. Ni povas klasifiki ilin en tri kategoriojn, nome :

a) la pazigrafiaj k filozofiaj sistemoj ;
b) la tute artefaritaj sistemoj ;
c) la sistemoj bazitaj sur la naciaj lingvoj.

#### A) Pazigrafiaj k filozofiaj sistemoj

Al tiu ĉi grupo apartenas la sistemoj, kiuj verdire ne proponis veran internacian lingvon, sed sistemon de universala skribo. Ĉiu vorto estas reprezentata per signo aŭ propra figuro (kiel ekzemple en la ĉina lingvo aŭ en la egiptaj hieroglifoj).

Ĉiu popolo legus aŭ interpretus ĉi tiujn signojn en sia propra lingvo. Ilia signifo estintus sama por ĉiuj popoloj, kiel - nuntempe - la arabaj ciferoj estas diversmaniere legataj de diverslingvanoj, ĉiam konservante, tamen, la saman valoron.

#### B) Sistemoj de artefaritaj lingvoj

En tiu dua grupo viciĝas la projektoj pri lingvoj skribeblaj kaj paroleblaj, sed kies vortoj estis arbitre elektitaj de iliaj aŭtoroj.

Sekve, ili havas nenion komunan kun la vortoj de la t.n. "naturaj lingvoj".

Claude VERNAY.
Elfrancigis : Lucien BOURGOIS.

---

Bulteno ofsete presita de :
Centre National Espéranto-Office, 9 bis, Rue du Commandant-de-Poli, Orléans (Loiret)

Le Gérant Responsable :
Lucien BOURGOIS, 21, Rue Gambetta, NOYELLES-GODAULT (62).